Krimliteraturo kreskas ĝenre

de Carlo Minnaja

Julian Modest:
Serenaj matenoj
eld. Libero, 2018
p. 95.

Unu vilaĝo, unu apuda urbeto, mistera alvenanto, klaĉema maljunulino, du geedzoj (ambaŭ tre okupitaj kuracistoj), junulino malaperinta, ŝia kamaradino, klasĉefo, komisaro, lia helpanto, busveturado: jen la esencaj ingrediencoj de krimromano, kies intrigo kaj klopodo solvi la enigmon iel memorigas pri Maigret kaj pri lia enketmetodo: intervjui, paroli, alproksimiĝi al la familio de la malperinta junulino, al ŝia medio. Nu, ordinarajoj ĉe polica esplorado.

Julian Modest, kies noveloj ofte gastis en nia revuo, estas ĉiam tre atenta pri detaloj, kiujn li priskribas skrupule, preskaŭ pedante: la ĉirkaŭa naturo, la vestaĵoj, la mienoj. Estas tuŝita la kutima problemo de nekomunikado inter gefiloj kaj gepatroj, kiuj, pridemandate, neniam kapablas helpi la enketantojn... ĉi tiu estas jam la tria mallonga krimromano de nia aŭtoro eldonita en 2018, apud *Murdo en la parko* (eld. Libero) kaj *Averto pri murdo* (eld. Espero), tiel ke inter novelaroj kaj mallongaj romanoj li jam atingis pli ol dekkvinon. Liaj romanoj neniam atingas cent paĝojn, ja la enigmoj konkretiĝas kaj solviĝas rapide, kaj oni legas dum malpli ol horo, trenate de la streĉo starigita jam en la unuaj linioj kaj tenata ĝis la lasta, vere la lasta; tial ankaŭ *Serenaj matenoj* estas tre konstrua kontribuo al la krimromana ĝenro.

La nuna verko estas rekomendinda ankaŭ al freŝaj kursfinintoj pro manko de tro rafinitaj vortoj: tamen enestas, almenaŭ en la bita versio kiu estis sendita por recenzo, la specifa stilero preskaŭ konstante forlasi la subjekton ĉe subordigita propozicio, kiam ĝi egalas al la subjekto de la ĉefpropozicio. Tion la gramatiko ne permesas, aŭ, minimume, ne konsilas; de tempo al tempo ĉe tiu aŭ alia aŭtoro ĝi jen kaj jen aperas kiel konscia apartaĵo; la unuajn fojojn ĝi agacas la okulon, en la postaj paĝoj ĝi fariĝas kutimo ne plu tiom ĝena. ❀

Serenaj matenoj



La abonkotizo por via LF en 2019 estas ankoraŭ 47,- eŭrojn!
Profitu ĝin ankaŭ por donaco al nepagipova amiko!